Gazeto de Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio

# La Verda Proleto

**Journal of SAT in Britain (SATEB)**

Numero 417 ~~~ Decembro 2001

## TERORISMO ESTAS REALAĴO DE MULTAJ JAROJ

Se oni demandas, kial terorismo ekzistas oni komprenas ke subpremo de ordinaraj homoj okazigas reagon.

Religiaj, politikaj, ekonomiaj subpremoj okazigas negativajn reagojn. Homoj bezonas liberiĝon de subpremoj. Konfliktoj nepre okazas kaj perforto rezultiĝas.

Registaroj en ĉiuj landoj devus pripensi la vivnivelojn de siaj civitanoj. Ĉiu devus ĝui la bazajn necesaĵojn de la ekzisto.

Neniu rajtas vivi en obscena troabundo dum ekzistas ekstrema povreco.

La kapitalisma emo akapari oleon kaj similajn riĉaĵojn, devigas al ili okupi sin en dubindaj aferoj, subtenante ne justajn celojn.

La hipokritikeco de la grandaj potencoj oni devas malkovri kaj malkaŝi.

## TERRORISM HAS BEEN A REALITY FOR MANY YEARS

If one asks oneself why terrorism exists, one understands that oppression of ordinary people causes a reaction.

Religious, political and economic oppression cause a negative reaction. People need liberation from oppression. Otherwise, conflicts always occur and result in violence.

Governments of all countries should consider the standard of living of their citizens. Everyone should be able to enjoy the basic necessities of life.

Nobody has the right to live enjoying obscenely excessive riches while extreme poverty exists.

The capitalist aim of monopolising oil, other valuable minerals and cash crops forces poor countries into questionable business deals in order to obtain unjust goals.

It is necessary to seek out and expose the hypocrisy of the great powers who perpetuate this practice.

# * S.A.T.E.B *

(Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio - *SAT in Britain*)

| | |
|---|---|
| Prezidanto / *Chairperson* | Mrs. Pearl Simons, 'The Cottage' 34 Beaulieu Drive, PINNER, Middx HA5 1NG Tel: 020 8429 3531 |
| Sekretario / *Secretary*: | Anne Johnson, 42 Beresford Road, ISLINGTON. London N5 2HZ. Tel: 020 7359 8102 |
| Kasisto / *Treasurer*: | Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, BRENTWOOD, Essex CM13 1EJ Tel: 01277 228962. <arturo@signalprent.demon.co.uk> |
| Redaktoro de / *Editor of* La Verda Proleto | Dum la manko de redaktoro, la komitato agas kiel redaktora komitato, kaj alia skipoelsendas ĝin. *In the absence of an editor, the committee is acting as an editorial team, and others dispatch it.* |
| Bonvolu sendi viajn kontribuaĵojn / *Please send your contributions:-* | per reto al / *by email to*: **arturo@signalprent.demon.co.uk>**<br>diskoj al la **kasisto** -adreso supre / *discs to the* ***treasurer*** *- see address above*<br>paperaj kopioj al / *paper copies to* Ian MacDowell, 40 Danehurst Rd., Wallasey, Cheshire, CH45 3JJ |

**Pri la enhavo de artikoloj kaj leteroj respondecas nur la aŭtoroj mem**

***Views expressed by contributors are not necessarily those of the organization***

**KOTIZOJ 2002**

**PAGU NUN VIAN SATEB KOTIZON por 2002**

uzu la formularon je paĝo 13

**PAY YOUR SATEB SUBSCRIPTION for 2002 NOW**

You can use the form on page 13

(SAT-anoj povos uzi la formularon ĉe paĝo 14 por SAT kotizoj)

## Jarkunsido 2002

Kunsendita estas la informilon kaj aliĝilon.
La preleganto Jakvo Schram loĝas en Antverpeno, kaj fervore aktivis en la laborista movado, en SAT, kaj aliaj progresemaj organizaĵoj.
La unua prelego temas pri belega domo, nun koncertejo, de Vooruit, iam la plej grava kooperativo en Belgio. La dua estas mem-klariga.

## LVP 418

Kontribuoj invitataj - limdato 1 Marto 2002

*Contributions are invited - to reach us by 1st March 2002*

## LVP - Fino de epoko

La kopiilo de Alan Gould paneis, kaj ne estos riparita. Li decidis fine ĉesi produkton de LVP. Pro liaj grandaj laboroj dum pluraj jaroj ni tre kore dankas lin. Ni emfazu ke la subaj informoj, tute ne rilats al li.

## *LVP - The End of an Era*

*Alan Gould has now retired from all work rilating to LVP following the irrepearble breakdown of his photocopier. We thank him most sincerely for all his past efforts. We would like to emphasise that he is in no way responsible for the problems described below*.

## LVP - Pardonpeto / Apology

La redaktora teamo pardonpetas pro la ege malfrua apero de LVP. Dum la periodo sen redaktoro, daŭre okazis problemoj pro la necesa divido de la koncernaj taskoj, krom fari la normalan laboron. Ĉi foje, la ĉefaj problemoj okazis antaŭ la momento de presado, do ne rilatas al la ŝanĝoj tiuflanke. Ni daŭre serĉas redaktoron, kaj se vi sentas ke vi havas la kapablon tion fari dependeble, bonvolu diskuti la aferon kun ni. Ne eblis prepari certajn materialojn ĵustatempe, do ili restas por la venonta eldono.

*The editorial team apologises for the very late appearance of LVP. During the time we have been without an editor, there have always been problems because of the need to divide the tasks as well as doing the normal work. This time, most of the problems arose before it was ready to print, so has little to do with the changes there. The committee is still looking for a competent Esperantist witrhin our members to become editor. Some material could not be prepared in time, so has been held over for the next edition.*

## 11 Septembro ktp.

Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.), eksciante pri la atencoj okazintaj kontraŭ Usono, esprimas sian hororon antaŭ tiuj abomenaj agadoj kaj kondamnas ilin, kvankam SAT ne forgesas, ke de jardekoj, la diversaj usonaj registaroj provokas krimojn en multaj landoj. Tamen, tio neniel pravigis, pravigas aŭ pravigos la murdon de senkulpaj viktimoj. SAT esprimas siajn kondolencojn al usonaj esperantistoj kaj al la familioj de viktimoj.

La SAT-sidejo

*(English resumé on next page)*_

## ***11 Septembro etc.***

*Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.), expresses its horror at the attrocities against the USA on September 11th, and condemns them. However, SAT has not forgotten that for decades, the various USA regimes have provoked crimes in many countries. Nonetheless, this can never and will never justify the murder of innocent victims. SAT condoles the US Esperantists, and the families of the victims.*

*The SAT-office.*

---

Du kontribuo sendita al la (retpoŝta) SAT-diskuto
*(2 contributions sent to the SAT (email) discussion group)*

S-ro Provinca-Ĉefo Jeb Bush,

Mi klare volas esprimi mian absolutan abomenon pri la fakto ke mem-konfesita teroristo, Orlando Bosch, vivas kiel libera homo en Florido. Mi sufiĉe koleras, ke via frato, George W. Bush, kiu estas nenio sed homo kun pretendoj al la usona prezidenta oficejo, nur devante aklami ĉi tiun pozicion pro la plej disputebla balotado en usona historio, ĝi tre ĉagrenas min ke li penus serĉi teroristojn ĉe la alia parto de la tero, por trovi kiujn ajn kulpiginte por la terorismaj atakoj en Vashington, Novjorka Urbo kaj la provinco de Pensilvanio je 11 sept. 2001, eĉ kiel la Taliban kaj bin Laden tute neis ian implikitan faradon en ĉi tiuj terorismaj agoj kaj ne sufiĉe estas publika-disponeblaj atestoj ke eble kulpigus lin.

Aliflanke, ambaŭ vi kaj via frato komplete scias, ke unu de la plej abomenaj teroristoj en ĉi tiu hemisfero, Orlando Bosch, jam konfesis lian respondecon de la kaŝa-metita bombo sur kuba civila aviadilo je 6 oktobro 1976, antaŭ du-dek kvin jaroj. Ĉi tiu homo ne vivas en kaverno en Afganlando, li ne vivas kun protektataj soldatoj kiuj gardas lin. Male, li malkaŝe vivas kiel libera kaj alirebla homo sur la stratoj de suda Florido hodiaŭ. Ĉi tiu kuba ekzilito kaj teroristo, Orlando Bosch, jam faris senkaŝeman konfeson pri la bombo ke eksplodis sur aviadilo de kuba flugkompanio post foririnte de la karibea insulo de Barbados oktobre, 1976. Ĉiuj de la sep-dek tri pasaĝeroj mortis, inkluzive la kubaj teamanoj de skirmado. Orlando Bosch, fasista kubano kiu vivas hodiaŭ en Miami, pasigis dek-unu jaroj kiel malliberulo en Venezuelo pro ĉi tiu ago. Li eskapis, sendube per la helpo de la usonaj kaŝa- spionaj agantoj de la CIA. Sed kial la homo daŭras loĝi kiel libera homo en Miami, sub via beno kiel provinca ĉefo de Florido, dum neniel, nenie, la homo povas atingi azilon aliloken en la mondo, ekscepte en Florido.

Ĉu ĝi estis la vivoj de sep-dek tri homoj aŭ la vivoj de sep-dek cent kaj tri homoj kiuj detruiĝis, la krimon ne estas malpli da abomena, ne estas malpli da riproĉinda.

Via frato, la usona prezidento, promesis ke iu ajn kiuj sekurigas ejojn por teroristo, li konsideros ilin kiel kulpaj tiel la sama teroristo sin.  Pro tio, tiom kiom kiel vi volas protekti ĉi tiun teroriston, mi devas konsideri vin ne malpli da abomena, ne malpli da riproĉinda ol la teroristo Orlando Bosch. Kiel vi volante protekti ĉi tiun teroriston, mi demandas ke vi rezignas vian pozicion kiel provinca ĉefo de Florido, ĉar tio estas insulto kontraŭ homeco, permesite la daŭran havenon de ia mem-konfesita krimulo kaj teroristo, kiam enketo jam antaŭe kulpigis lin de amasmurdigo.

Kiom da tempo vi permesus alian nacia-staton, permesite ĝian daŭran protektadon de ia mem-konfesita teroristo kontraŭ Usono? Du-dek kvin jaroj? Tio ekzakte estas la tempo ke la kuba popolo jam atendis kaj eltenis, sciante ke nia registraro kaj specifike vi, kiel la provinca ĉefo de Florido, permesas tian leĝan loĝlokon de ĉi tiu teroristo, Orlando Bosch.

La restanta civilizita mondo ne ignoras la duobla-normon ke la Usono altrudas sur aliajn naciojn kiujn ne partoprenas la saman politika-ekonomion kiel Usono, kaj la mondo sammaniere ne daŭros ignori la duobla-normon ke la Usono igas koncerne la mondo ke estas minacata far terorismo.

Se vi deziras fari lukton kontraŭ terorismo, oni unue devas fari tion ĉe Usono.

Mi daŭros observi viajn publikajn agojn en Florido koncerne la teroristo Orlando Bosch.

subskribante, Nathan M. Gant,
deloĝanto kaj civitano de Florido 6 Oktobro 2001

## **Paca Plano:**

Sinjoro Prezidanto George W. Bush, bonvolu, proponi al G-7, la jenon:
1- Anglio liberigu Irlandon.
2- Francio kaj Hispanio redonu la teritoriojn al la baskoj.
3- Turkio kaj Irano konsentu pri la petoj de la kurdoj.
4- Rusio liberigu Ĉeĉenion.
5- Ĉinio malokupaciu Tibeton
6- Konsiderante ke Israelo estas tre malgranda teritorie, Usono donacu parteton de sia propra teritorio kaj translokigu la Israelan Ŝtaton, sen armiloj, sen konfliktoj kaj sen teroristoj. Lim-dato de 5 jaroj sufiĉos por konstrui kaj urbanizi terenon de tia grandeco.

7- Fine agnoski la Palestinan Ŝtaton, kies ĉefurbo estu en Gaza. La judoj kiuj deziras resti en la regiono, reakiru la palestinan civitanecon, tiel kiel estis la situacio antaŭ la Dua Mond-Milito.
8- Deklari Jeruzalemon kiel mondan protektejon kaj malfermitan urbon sub la administrado de UN.
9- MFI (Monda Fonduso Internacia) kaj Monda Banko rekonsideru aŭ pardonu la eksteran ŝuldon de la malriĉaj landoj.
10- Monda Orgnanizaĵo pri Sano sendu senpagajn medikamentojn al aidosaj malsanuloj en Afriko;

Tiuj ĉi decidoj donos finon al motivoj de ekzisto de grupoj kiaj ETA, IRA , Hizbolla, Al Qaeta kaj aliaj teroristaj organizoj.

Post fari tion, sinjoro Prezidento, vi rajtos fari belan foton ĉirkaubrankante Gorbatchov kaj Mandela, tiel enirante en la galerion de la signifaj homoj de la mondo.

Pacajn Salutojn,

(El diskut-listo administrata de Brazila Federacio de Psikodramo)

## Eŭroscola-tago

Ĉiujare, la Eŭropunia Parlamento organizas Eŭroscola-tagojn. Ili konsistas el renkontigo de 600 eŭropaj gimnazianoj por al ili travivigi, en unu tago kaj pluraj lingvoj, sesion de la Eŭropunia Parlamento.

Je la 8a de majo 2001, plie de la multaj lingvoj jam ĉeestantaj, la Eŭropunia Parlamento akceptis Esperanton !Tiu tago estis granda sukceso por ni... sed tio ne finiĝu.

Eŭroscola en Esperanto okazis en majo 2001.Nun ni ĝin kune reokazigu en majo 2002 !

PRI LA APERO DE LA NOVA RETEJO E-EUROSCOLA.

De la 21a de aŭgusto 2001, la projekto Eŭroscola-en-Esperanto nun havas tute novan retejon, kies adreso estas :
>->->-> http://e.eŭroscola.free.fr <-<-<-<

Sekvante Xavier-n GODIVIER, mi nun zorgas mem tiun taskon. Por ĉia rimarko aŭ peto de informo, retmesaĝu al mi ĉe <e.eŭroscola@free.fr>.

PRI LA KONSISTO DE LA RETEJO E-EUROSCOLA.

La retejo celas doni al la interesatoj helpon, informojn pri la farotaj klopodoj, pri la novaĵoj... Ĝi tial entenas kvin rubrikojn jenajn :

1- Nuna stato.
Sciu la nunan staton de la projekto por la jaro 2002, la portantojn de la projekto kaj la liston de la parto-prenontaj lernejoj.

2- Kiel partopreni.
Ĉi tie estas difinitaj la celo de la pluvivo de nia projekto E-Eŭroscola kaj la farendaj klopodoj por bone prepari la Eŭroscola-tagon. Plie, en tiu rubriko tiuj, kiuj deziras partopreni la projekton, tuj povas plenigi la formularon por partopreno !

3- Eŭroscola 2001.
Travivu aŭ retravivu tiun gravan 8an de majo 2001 legante la kompletan dosieron pri tiu Eŭroscola-tago, kiam esperantistan delegacion la Eŭropunia Parlamento akceptis por la unua fojo, kaj vidu la liston de la tiam parto-prenintaj lernejoj.

4- Retlisto E-Eŭroscola.
Pere de la dissendolisto E-Eŭroscola la agantoj de Eŭroscola-en-Esperanto interkomunikas. Abonu la liston kaj konsultu ĝian retejon ĉe YahooGroups !

5- Lastaj novaĵoj.
Informu vin pri la lastaj novaĵoj rilataj al la projekto Eŭroscola-en-Esperanto.

La enhavo de la retejo tre ofte kaj regule ĝisdatiĝos.

----
Ĉar Eŭroscola-en-Esperanto estas ĉies afero, ĉar Eŭroscola-en-Esperanto estas la afero de ĉiuj eŭropaj asocioj landaj, junularaj kaj instrufakaj, ĉar ĝi estas ĉefa fruktodononta entrepreno por Esperanto en Eŭropo, ni tuj laboradu kune por plej laŭte aŭdigi la voĉon de nia lingvo en la Eŭropunia Parlamentejo maje 2002 !

Samideane kaj plej elkore via,

Xavier DEWIDEHEM,
Respondeculo pri la retejo E-Eŭroscola,Estro de la franca grupo de la Esp-delegacio kaj Prezidanto de la Esperantista Komisiono en majo 2001.

-----
E-EUROSCOLA | http://e.eŭroscola.free.fr
EUROSCOLA EN ESPERANTO POR LA JARO 2002!

Por aboni la retliston E-Eŭroscola, bv. sendi malplenan mesaĝon al : e-eŭroscola-subscribe@yahoogroups.com

(La supra estas retletero sendita al la oficejo de S.A.T. kaj al ties eŭropaj landaj perantoj havantaj retadreson.)

*(Euroscola is an arrangement where people can spend a day in the European Parliament, and the group concerned has allowed the use of Esperanto, and has also got a WEB page.)*

# Kiel trakti naciistojn

Min interesas la pensema kaj elokventa artikolon de Robert Blow in numero 416 , kio estis reago al mia artikolo in 415.
In tutaj socioj ekzistas nereduktebla tria de homoj kun afiksado al naci-kulturo. La demando estas kiel dividigi tion eblan danĝeron. In la usono la metodo kontrau la indigena naciojn estis dividigi la tribojn in apartajn rezervaĵajn. Kiel Robert Blow atentigas la rezervaĵajn estas armilo de la ŝtato in tio okazo de la burĝa ŝtaton. Kio mi proponas estas kuraĝigi la nacian burĝaron dividigi mem inter tribojn por ke ĝia nacia unueco malfortigas . Ĉu estas eble konfuzi la nacian burĝaron facile? Ĉu la kaptilo fonkcius? La malgranda koncesio de malgrangaj hejmlandoj por gajni la memfido de la naci-burĝaron. La hejmlandoj ne devas esti apudaj kaj la oferto eble dividigas ilin ĉar la loĝikaj problemoj de tribismo kaj naciismo . kial decidi kiujn estas ano de la triboj. Kiu estas est estangla ? Kiu estas nordestangla?

Sed ne estas necese cinika voli konservi aliaj kulturajn eĉ kulturoj kun hontaj aspektoj. Mi dirus ke la konservo de kulturaj estas simila al la konservo de specioj. Tutaj specioj devas travivi sed certaj specioj ni ne volus etendi ĉar ili estas tro danĝeraj. Aliaj ni devas kuraĝigi ekzemple la amerikanaj indgenoj.

Robert estas sentema de la povero de naci-kuturo. Li skrivis ke " la premanto rabas…. la kulturo…kaj…identecoojn de fremdaj nacioj".Ankau skrivis ke ĝia " naci-identeco estas ŝtelita". Pli malfrue in lia artikolo li diris ke " lau mi ambau la kimra kaj angla (au io ajn) naciismoj estas senvaloraj". Kion ili rabas estas senvalora!

Mi scias ke ekzistas homoj ke kredas ke estus plibbona se la kimroj forlasus ilian kulturo kaj ke ĝi estas unu obstakulo pli malgranda de ni komunikigantoj inter sin in la mondo.Sed mi ne povas diri ke mi estas entuziasmulo de la homogenigo de la mondo au la terglobigo . Robert diris ke " La naci-kulturo estas nur la idearo de la loka au nacia mastraklaso". Li diris " La mondlaborista ne vere posedas sian prorian kulturon ni nur imitaĉas la kutimojn kaj emojn de la burĝaro".
" Diru al ni kiujn kuluraĵojn ni devus subteni"
Mi diris in mia artikolo fakte ke la plimulta parto devas esti kosmopolita. Sed mi devas diri ke ke mi admiras aliajn kulturojn tial Robert admiras la germana Beethoven kaj li diras ke eĉ por li la angla estas fremda. Kaj parto de la mikso ke li admiras. Sed mikso bezonas ingrediencojn. Ĝui la mikso estas ĝui la ingredieciojn. Robert diris ke la monlaborista klaso ne estas ebla krei klaskulturo.Estis la espero de Gramsci ke la proleto povas krei sian proprian kulturon. Se Robert estas korekta ke Gramsci

estas malkorekta . Kial ni devas imiti la angloparolantan grandan burĝaron kaj kial ni ne devas imiti la presentan malfortan malgrandan au nacian burĝaron.

D Lawson

---

## **Leteroj**

Mi legis kun intereso kaj la kontribuaĵon ("Egaleco en naciismo", *LVP* 415) de Martin Lawson kaj la reagojn al ĝi de Anne Johnson kaj Robert Blow. K-do Martin priskribis la establon de etne difinitaj "areoj", kiuj estus kvazaŭ insuloj meze de kosmopolitaj teritorioj, en kiuj regus la principo, ke ĉiu rajtas enmigri kaj elmigri laŭplaĉe. Gek-doj Anne kaj Robert (*LVP* 416) kritikas la ŝajnan implikitecon ankaŭ de tiu ĉi koncepto kun la naciismo. Laŭ mi, ili haste juĝis. Mi bedaŭras, ke Martin ne pli precize priskribis la "areojn" de etna kulturo. Ŝajnas al mi, ke li estas sur la ĝusta vojo.

La propono de Martin estas esence kontraŭdira al la naciismo. Karakteriza trajto de la naciismo, almenaŭ de ĝia etna vario, estas la strebado etnizi la tutan mondon. Naciistoj etnizas:
a) la homojn, kiujn ili sisteme provas "enfakigi" etne, kutime surbaze de la gepatra deveno (oni rimarku ekzemple kiel iuj esperantistaj naciistoj adoraĉas la "gepatrajn lingvojn"), kaj
b) ĉiujn loĝeblajn teritoriojn de la Tero, kiujn ili volus distribui tiel, ke ilia etna homogeneco estu maksimumigita.

Kosmopolita kaj plurisma mondo, se ĝi estas ankaŭ mondo de liberaj homoj, devas lasi al homkolektivoj la liberecon apartiĝi de la ĝenerala socio kaj disvolvi sian grupan kulturon, kondiĉe, ke ili ne tretas la rajtojn de aliaj dum tio. Tiaj kolektivoj povas formiĝi pro multspecaj afinecoj, i.a. etnokulturaj. Ĉu ne eblas akcepti, ke homoj kun etnofiliaj emoj aĉetu aŭ luu neloĝatan terenon, kaj konstruu tie vilaĝon por si? Tie ili rajtus enkonduki iun etnan lingvon, etnan manĝaĵon, etnan muzikon kiel devigan por ĉiuj, postuli elmontradon de unu difinita identeco aŭ eĉ limigi la eniron al homoj de unu etna deveno. Tio, kion en la nuna socio rajtas nudistoj, religiaj sektoj, agrikulturaj komunumetoj kun politika celaro, tion oni en libera socio certe povas permesi al la naciemuloj.

Sed ne pli. Malakcepti naciismon signifas malakcepti ĉian privilegiigon de etneco super aliaj kulturdifinaj kriterioj. Homoj, kiuj ekzemple ankoraŭ kredas je la "rajto" de nacia memdeterminado, t.e. la "rajto" de grupo sin difinanta kiel etno establi sian grupan suverenecon sur vasta teritorio, je kiu ĝi pretendas historiajn rajtojn, ankoraŭ ne liberiĝis de naciismaj

antaŭjuĝoj. Ni kontraŭstarigu al la naciismaj trudoj la principon de *individua* kultura memdeterminado.

Gary Mickle

---

Karaj gekamaradoj,

Antaŭ kelkaj tagoj 300 homoj decidis marŝadi tra la stratoj de Athy, urbeto en Irlando. La kialo? Por subteni la laboristoj de ‘Peerless Rugs’ ( ‘Senegalaj Tapiŝetoj’ –S.T.), kiuj ek de julio okupadis sian fabrikon por protesti la decidon de la administrantoj fermigi ĝin, kaj ne pagi la promesitajn balastig-monon al siaj laboristoj. S.T. informas ke ĝi bankrotiĝis, kvankam ĉiuj bone scias ke ĝi fakte jam translokigis produktadon al fabrikoj alilokajn.

La laboristoj de S.T. tamen, anstataŭ fidante al sindikatoj (ili scias ke tiuj estas koruptema kaj reformema), spontane kaj solidarece agadis ekde ili komprenis, ke ili ne ricevos financan kompenson malgraŭ la promesoj de la mastro Martin Buckley (Buckley mem devis pasigi plurajn horojn kaptitajn en sia oficejo antaŭ ol la policanoj povis savigi lin).  Sekve, la laboristoj decidis transpreni la fabrikon kie ili laboris, la fabriko kiun ili scias pli bona ol iuj ajn.

La okupado, gekamaradoj, jam daŭras dum pluraj monatoj, kaj ne estas nenia signo ke ĝi baldaŭ finiĝis. La sindikatestroj, kompreneble, provas konvinki la laboristojn fini la protestadon kaj akcepti kompromisojn (kiun sendube oni retiros poste), sed sen sukceso. Evidente la forta subteno de la loka loĝantaro al la laboristoj helpas kuraĝigi ilin, do ili ne volonte cedas la batalon.

Laŭ mi, la batalo ĉe Athy indikas multajn. Unue, la rezultoj, kiujn oni povas atingi kiam la laboristoj unuigas kun la lokaj homoj, kiuj mem rekonscias (kvazaŭ magie) ke ili ankaŭ estas laboristoj kaj laboristaranoj; ke ili ankaŭ, pro sia solidareco demonstrita unu tago, povas esperi ricevi la saman solidarecon alian tagon. Sed pli interese, gekamaradoj, ĝi indikas la konstantan ligilon inter anarkiismo kaj la homa instinkto (malgraŭ ĉiuj opinioj de la amas-komunikiloj), por interhelpi unu la alian. Fakte, gekamaradoj, la laboristoj kaj gelokuloj de Athy ne estas anarkiistoj  Ili estas simple homoj, kiuj agadas kiel homoj. Kaj kiam oni ekfaras tion, tiam eble la anarkiisto interne de ĉiu leviĝos al la supraĵo. Eble, gekamaradoj, tiu ĉi silenta revolucio jam komencis!

Alĉjo

(AF-Irlando)

**Declaration of the 74$^{th}$ SAT Congress**
(Translation of the Esperanto text on the next page)

The 74th Congress of Sennacieca Asocio Tutmonda, taking place in Nagykanizsa (Hungary) from the 14$^{th}$ to the 20$^{th}$ of July 2001, and comprising 176 people from 27 countries of the 5 continents declares:

The Congress notes that in the present day world, there reins a greater and greater liberal globalization, forced by large capitalist enterprises.

This globalization leads to a deepening of the abyss between rich and poor levels in the world population whether in rich or in poor countries.

It instigates greater exploitation, and slavery, of women and children.

It increases the debt burden on the poorest countries, thus preventing their economic and social evolution.

The Congress supports efforts and battles against the new liberalism and crude capitalism.

The Congress condemns the politics of those European governments which are creating a new iron curtain between the west and east of Europe and the countries of the so called "Third World" by the introduction of visa systems, and the limiting of exchange visits of citizens of various countries.

It condemns the existence of the death penalty in many countries.

It condemns all suppression of ethnic groups and peoples and also all types of nationalism.

It condemns false democracies and their anti-worker activities, and opposes abolition of the Mayday holiday.

The Congress supports all worldwide organizations that presently stand peacefully against groups that were not democratically elected (MB, IMF, etc.). The Congress condemns the struggle to rule our world to the profit of a few rich sections of all populations.

*(The resolution committee presented a draft of this text, which was debated by the congress and accepted after amendment as above)*

## Deklaracio de la 74a Kongreso de SAT

La 74a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, okazinta en Nagykanizsa (Hungario) de la 14a ĝis la 20a de julio 2001, kaj ariginta 176 homojn el 27 landoj de la kvin kontinentoj deklaras:

La Kongreso konstatas, ke en la nuna mondo regas pli kaj pli liberala tutmondiĝo trudata de grandaj kapitalismaj entreprenoj.

Tiu tutmondiĝo kondukas al profundiĝo de abismo inter riĉaj kaj malriĉaj tavoloj de la monda loĝantaro, ĉu en riĉaj landoj, ĉu en malriĉaj landoj.

Ĝi instigas al pli granda ekspluatado kaj al sklavigo de infanoj kaj virinoj.

Ĝi plipezigas la ŝuldoŝarĝon sur la malplej riĉaj landoj, tiel malebligante ties ekonomian kaj socian disvolviĝon.

La Kongreso apogas klopodojn kaj batalojn kontraŭ la novliberalismo kaj kruda kapitalismo.

La Kongreso kondamnas la politikon de tiuj eŭropaj registaroj, kiuj starigas novan feran kurtenon inter la okcidenta kaj orienta Eŭropo kaj la landoj de la t.n. Tria Mondo per enkonduko de vizaj reĝimoj kaj limigo de reciprokaj vizitoj de civitanoj el diversaj landoj.

Ĝi kondamnas la ekziston de mortopuno en multaj landoj.

Ĝi kondamnas ĉiujn subpremojn kontraŭ etnoj kaj popoloj kaj ankaŭ ĉiajn naciismojn.

Ĝi kondamnas false demokratiajn reĝimojn kaj iliajn kontraŭlaboristajn agadojn kaj kontraŭstaras abolon de festotago de la 1a de majo.

La Kongreso subtenas ĉiujn tutmondajn organizojn, kiuj nun senperforte staras kontraŭ ne demokrate elektitaj grupoj (MB, IMF ktp.). La Kongreso kondamnas la strebadon regi nian mondon je la profito de kelkaj riĉaj tavoloj de ĉiuj popoloj.

*(La Proponkomisiono, konsistanta el kamaradoj Vincent Charlot, Gary Mickle kaj Jakvo Schram, kunvenis trifoje kaj proponis tekston. Post modifo dum debato, ĝi estis akceptata, kiel supre, de la partoprenantaj anoj.)*

# * S.A.T.E.B *

## (Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio - *SAT in Britain*)

SATEB's main objective is to help ordinary people to communicate throughout the world on social, political and worker matters, injustices etc. This is done in conjunction with the parent organisation SAT and by means of the relatively simple international language Esperanto.

SATEB offers:- Contact with, and introduction to, SAT; Help in learning Esperanto; Regular contact through the journal "La Verda Proleto"; Book service; An annual conference weekend in Britain giving opportunities to practice the language, listen to foreign speakers about other parts of the world, and discuss political, social and similar subjects.

SATEB makes contacts with socialist, trade union, co-operative, peace, and similar movements in Britain and provides local support for SAT, which publishes a regular journal, a literary review, and various books etc. as well as holding an annual congress in various parts of the world

**For further information** please complete the form below and send to the secretary: Anne Johnson, 42 Beresford Rd, Islington, London N5 2HZ, or send an **email** to arturo@signalprent.demon.co.uk

Membership (including "La Verda Proleto"): £5 (for those with low incomes the minimum is £2)

*Renewals:- send form and payment to treasurer (address on p 2)*
Realiĝoj:- sendu formularon kaj pagon al la kasisto (adreso p 2)

*cut* > - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - < *tranĉu*

☐ *Please send more information* Bonvolu sendi pli da informo

☐ *Please send membership form* Bonvolu sendi aliĝilon

☐ *Membership renewal* / Realiĝo

*Date* / Dato ____________________

*Name* / Nomo ______________________________________________

*Address* ______________________________________________

/ Adreso ______________________________________________

(*optional* / } *Phone* / Telefono ____________________________________

nedeviga )} *email* / retpoŝto ____________________________________

*Tick the box if we may your details to other Esperanto organisations*
Marku se ni rajtas sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto organizaĵoj ☐

*I enclose* / }:- *subscription* / kotizo £__________

Mi kunsendas } *donation* / donaco £__________

*Total* / Sumo: £__________

*cheques payable to* / ĉekoj pagendaj al "SATEB"

*cheque/PO/other*____________ ĉeko/poŝtmandato/alia______________

# Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT

**Monda asocio de laboristoj, uzante Esperanton**

Celas faciligi kontaktojn inter laboristoj (en la pli vasta senso de tiu vorto) tra la tuta mondo kaj uzi kaj antauenigi la lingvon Esperanto. Ĝi eldonas la organon "Sennaciulo", per kio la membroj kaj prezentas kaj informiĝas pri laboristaj aferoj, sociaj situacioj, (mal)justecoj, ktp. Ĝi eldonas "Sennacieca Revuo"-n (literatura kolekto), librojn kaj broŝurojn kongrue al la celoj, kaj laŭ necese vortarojn, aliajn librojn, ktp.

La demokrata strukturo kaj organizado de SAT ne baziĝas sur naciaj limoj.

SAT kongresas ĉiujare en diversaj mondo-partoj, "Sennaciulo" aperas preskaŭ ĉiumonate, "Sennacieca Revuo" aperas jare. Adresaro, (regule ĝisdatigita), ebligas rektajn kontaktojn inter la anoj.

Membro-kotizo: £31 (malriĉuloj, kiel senlaboruloj, emerituloj, studentoj, rajtas pagi £15.50). Membroj ricevas "Sennaciulo"-n, "Sennacieca Revuo"-n, kaj adresaron. kaj rajtas rabaton por kongres-kotizoj.
Nemembroj rajtas aboni al "Sennaciulo" kun "Sennacieca Revuo" kontraŭ £34, aŭ nur Sennacieca Revuo kontraŭ £5, sendita al la peranto.

Oficejo: SAT, 67 Ave Gambetta, F-75020 Paris, France. Retadreso: satesper@noos.fr> TTTpaĝo: http://www.multimania.com/satesperanto

**Uzu la suban formularon por informpetojn kaj pagojn por Britio**, kaj sendu al la peranto: Arturo Prent, 7 Walton Gdns, Hutton, Brentwood, Essex, CM13 1EJ (Ĉekoj pagendaj al "SAT") Retadreso: arturo@signalprent.demon.co.uk

*tranĉu* >- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

***sendu al la peranto (vidu supre)***

☐ Bonvolu sendi pli da informo pri SAT ☐ Bonvolu sendi aliĝdeklaron ☐ Bonvolu sendi informon kaj aliĝilon por la SAT Kongreso

☐ Realiĝo / abono Dato ______________________

Nomo ______________________________________________

Adreso ______________________________________________

______________________________________________

(nedevigaj)-> Tel: ______________________________________

retadreso: ______________________________________

☐ Marku la skatolon se vi volas permesi al ni sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto organizaĵoj

Mi kunsendas:- kotizon £________+ donacon*£________Sume:- £_________

per ĉeko/poŝtmandato/______________ (Ĉekoj al "S.A.T.")

*celo por donaco__________________________________

## Gvidrezolucio de la 74a Kongreso de la Sennacieca Asocio Tutmonda

La Kongreso salutas la plivigliĝon de la Ĝenerala Konsilantaro kaj gratulas ĝin kaj ĝian sekretarion pro ĝia agado.

Ĝi konsideras, ke la ĜK devas plenumi siajn laŭstatutajn taskojn. Ĝi ankaŭ taskas la ĜK-on resumi diskutojn, konkludi el ili kaj konsili la PK-on.

Ĝi gratulas la redaktoron de Sennaciulo pro kvalitaltiĝo de S-ulo.

Ĝi alvokas ĉiujn SAT-anojn sendi artikolojn kaj informojn al SAT, kontribui al plurismo kaj opinidiverseco en Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo.

La Kongreso konsideras, a) retaliron b) kapablon uzi retpoŝton

gravaj faktoroj de kunlaboro en la PK, la ĜK kaj la Konfliktkomisiono. Ĝi alvokas al solidara helpemo de SAT, por ke la elektitoj disponu pri tiuj rimedoj.

La Kongreso alvokas ĉiujn SAT-anojn retanojn aliĝi al la SAT-Diskuto.

La Kongreso substrekas la neceson, ke frakcioj novaj kaj malnovaj plivigligu sian agadon en la propra medio.

La Kongreso admonas ĉiujn instancojn de SAT respekti la Statuton de nia Asocio.

La Kongreso konsideras, ke la problemo de la Publika Letero de PK al KEK jam tro damaĝis al la Asocio. Por ke repaciĝu la interna etoso de SAT, la Kongreso nuligas la nestatutajn postulojn al membroj de SAT entenitajn en tiu letero.

Ĝi memorigas pri la graveco de la biodiverseca agado de AVE kaj TANEF.

La Kongreso gratulas pro la agado plenumita komisie de la PK kaj alvokas ĉiujn SAT-anojn konkrete agadi tra la mondo kontraŭ novliberalisma tutmondiĝo. Ĝi instigas al paca partopreno en manifestacioj nome de SAT. La kongreso aprobas la kreon de laborkomisiono kiu ellaboros materialon necesan por tiu partopreno.

Ĝi aprobas la partoprenon de la PK en la konferenco kontraŭ la mortopuno kaj instigas ĉiujn SAT-anojn engaĝiĝi en agado celanta abolon de la mortopuno kaj aparte alvokas savi la vivon de kamarado N. I. Sekvojo (Billy Waldon) kaj instigas daŭre kontribui al la fonduso tiucela.


Ĝi subtenas la agadon de Amnestio Internacia kaj de neregistaraj homrajtaj organizoj kaj instigas SAT-anojn partopreni en ili. Ĝi ankaŭ alvokas plene subteni la Mondan Fonduson kontraŭ Malsato.

Ĝi konfirmas la duan paragrafon de la Gvidrezolucio de la Moskva Kongreso kaj denove sugestas al la LEA-oj, ke ili serĉu kaj trovu rimedojn por efektivigi la proponon de la Mesaĝo al gvidantaro de UEA kaj LEA-oj ligitaj al SAT� (vidu numeron de Sennaciulo de aŭgusto-septembro 2000)

Ĝi alvokas la SAT-anojn informiĝi pri la diversaj starpunktoj pri la temo lingvaj rajtoj.

La Kongreso alvokas ĉiujn SAT-anojn retanojn aliĝi al ATTAC-Diskuto (interreta) kaj diskonigi tieajn informojn.

Ĝi mandatas la PK organizi kampanjon por la l iberigo de la membroj de PORTOS malliberigitaj en Rusio (vd. dosieron en la januara numero de Sennaciulo 2001)



# 75-a KONGRESO DE SAT

# ALICANTE - Hispanio -

# 01-08.07.2002

**Organiza Kongresa Komitato**:

**Prezidanto**: Martin Bustin Benito.Apt. de Correos 4143. ES-03080 ALICANTE.
**Tlf**. 00-34-965184596.
**Retadreso**:marteno@ctv.es
**Bankkonto:** Martin Bustin Benito,
BBVA 0182-0102-13-0201509277
**Sekretariino:** Liya Mazij (samaj adresoj)

KONGRESKOTIZOJ

| Ĝis la dato | 31.12.2001 | 31.03.2002 | 31.05.2002 | Poste |
|---|---|---|---|---|
| SAT-membro | 46,15 € | 55,38 € | 66,15 € | 76,92 € |
| SAT-geedzoj | 73,85 € | 89,23 € | 106,15 € | 123,08 € |
| SAT-gejunuloj | 23,08 € | 27,69 € | 55,38 € | 55,38 € |
| Gastoj | 61,54 € | 70,77 € | 81,54 € | 92,31 € |
| Gastoj-geedzoj | 96,92 € | 112,31 € | 129,23 € | 146,15 € |
| Gastoj-gejunuloj | 30,77 € | 36,92 € | 43,85 € | 50,77 € |

Noto : Ĉiuj prezoj estas en Eŭroj

Infanoj (ĝis 15 j.) ne pagas kotizon

La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko

La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 40% rabaton

La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 60% rabaton.

La aliĝilon vi povas peti al la OKK, al la SAT-Centro, al la SAT peranto, aŭ (de ligo al la SAT ttt-paĝo) elŝuti en la formato PDF.

***<u>SAT Congress 2002 in Alicante, Spain</u>***

*This page gives details of the attendance fees etc.  As the participants will come from many parts of the world, the programme will only be in Esperanto, the working language of S.A.T.*